

2a PASKA DIMANĈO 3-a de aprilo 2016

JESUO APERIS, DUM LA PORDOJ ESTIS FERMITAJ

Komento de P. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Johano 20, 19-31

Kiam vesperis en tiu unua tago de la semajno, la disĉiploj estis kune en la vespermanĝejo, kun pordoj ŝlositaj pro timo antaŭ la Judoj. Subite Jesuo venis, ekstaris meze de ili kaj salutis ilin: „Paco al vi!“. Poste Li montris al ili Siajn manojn kaj Sian flankon. La disĉiploj ĝojis, vidante la Sinjoron. Denove Jesuo diris al ili: „Pacon al vi! Kiel la Patro sendis Min, tiel ankaŭ Mi sendas vin“. Kaj, dirinte tion, Li elspiris sur ilin, kaj diris: „Ricevu la Sanktan Spiriton: kies pekojn vi forviŝos, al tiuj ili estos forviŝitaj; kies vi ne forviŝos, al tiuj ili ne estos forviŝitaj“.

Tomaso, nomata Ĝemelo, unu el la dek du disĉiploj, ne estis kun ili, kiam Jesuo venis. La aliaj disĉiploj tiam diris al li: „Ni vidis la Sinjoron!“. Sed li deklaris: „Se mi ne vidos en Liaj manoj la truojn de la najloj, se mi ne metos mian fingron tien, kaj se mi ne tuŝos per la mano la vundon de Lia brusto, mi ne kredos“.

Post ok tagoj la disĉiploj denove estis tie, kaj ankaŭ Tomaso kun ili. La pordoj estis fermitaj. Jesuo aperis, haltis en la mezo kaj salutis: „Paco al vi!“. Poste Li diris al Tomaso: „Etendu ĉi tien vian fingron kaj rigardu miajn manojn; etendu vian manon kaj tuŝu Mian vunditan bruston. Estu ne plu nekredema, sed kredanta!“. Tomaso respondis al Li: „Mia Sinjoro kaj mia Dio!“. Jesuo diris al li: „Vi kredas, ĉar vi Min vidis: feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis kaj tamen kredas!“.

Jesuo faris multajn aliajn miraklajn signojn antaŭ siaj disĉiploj, kiuj ne estis skribitaj; sed ĉi tiuj estis skribitaj, por ke vi kredu, ke Jesuo estas la Mesio kaj la Filo de Dio. Se vi kredas je Li, pere de Li vi havos vivon.

Oni ne povas kredi, ke Jesuo resurektis, ĉar estas tombo malplena, sed ĉar oni renkontas Lin vivan, vivantan kaj vivigantan, en onia ekzisto kaj en onia sperto.

Tion asertas Johano en ĉi tiu teksto. Li skribas: *"Kiam vesperis en tiu unua tago de la semajno,..."* Tio resendas al la unua tago de la kreado (Gen 1, 5). Ekde la resurekto de Jesuo komenciĝas nova kreo, ne spertonta finon kaj morton, sed vivonta plue.

"...la disĉiploj estis kune en la vespermanĝejo, kun pordoj ŝlositaj pro timo antaŭ la Judoj". Ni memoru, ke la aresto estis decidita por ili ĉiuj, ne nur por Jesuo: ne estis danĝera nur la majstro, sed la doktrino. Jesuo aĉetis per sia vivo la savon de siaj disĉiploj kiam Li diris: *"Se do vi min serĉas, lasu ĉi tiujn foriri"* (Joh 18, 8), sed la timo restis. *Subite Jesuo venis, ekstaris meze de ili...* Ankaŭ tiu estas grava punkto. Kiam Li renkontas la disĉiplojn, Li estas meze. Nek antaŭe nek supre. Ne ekzistas rango koncerne la proksimecon al Jesuo: ĉiuj rilatas je la sama distanco. *"...kaj salutis ilin: 'Paco al vi!'"*. Ni ne miskomprenu. Ne temas pri invito aŭ pri bondeziro, kiel en la liturgia frazo *"la paco estu kun vi"*. Temas pri donaco. Kiam Jesuo manifestiĝas en la centro de sia komunumo, li donacas la pacon, do ĉion necesan por la feliĉo homa.

"Poste Li montris al ili Siajn manojn kaj Sian flankon". Laŭ la juda kulturo, paco estis ĉiam akompanata de io konkreta. Kiam Jesuo donacas tiun pacon, Li montras ankaŭ, de kie ĝi venas. Kial Li montras la manojn kaj la flankon? Ĉar tiuj estas la pruvoj de Lia torturo kaj pasiono. Tio signifas: *"Jen la amo pro kiu Mi oferis Mian vivon por vi kaj Mi mortis krucumita, kaj tio daŭre restas"*, aŭ resume: *"Do aliajn zorgojn ne havu"* Estas tio la paco, kiun Jesuo donacas.

"La disĉiploj..." (kiuj antaŭe restis pro timo malantaŭ ŝlositaj pordoj, nun *"...ĝojis, vidante la Sinjoron"*.

Denove Jesuo diris al ili: 'Pacon al vi!' Refoje la donaco de la paco: *Kiel la Patro sendis Min,...* La Patro sendis la filon por montri amon senfinan, al ĉiuj homoj *tiel ankaŭ Mi sendas vin'*. "Do Jesuo sendas siajn disĉiplojn, por ke ankaŭ ili montru la saman amon senkondiĉan, de la Patro al la tuta homaro. *"Kaj, dirinte tion, Li elspiris sur ilin, kaj ankaŭ tio memorigas la kreon de la unua homo, kiam Dio blovis kaj enmetis la vivon en sian kreitaĵon (Gen 2,7). "kaj diris: „Ricevu la Sanktan Spiriton:," nome la saman*

forton, la saman povon, la saman kapablon ami Dion. *"' kies pekojn vi forviŝos, al tiuj ili estos forviŝitaj; kies vi ne forviŝos, al tiuj ili ne estos forviŝitaj"*.

Jesuo invitas ilin al pludaŭrigo de tiu viv-ofero de Li plenumita. Tio ne estas transdono de povo al iuj, sed de kapablo kaj respondeco al ĉiuj disĉiploj. Ili disdonu viv-oferon, kiu, se akceptita, forviŝos tuj la pasintecon pekintan.

"Tomaso, nomata Ĝemelo", unu el la dek du disĉiploj, ne estis kun ili, kiam Jesuo venis". Kial tiu kroma nomo? Ĉar nur li montris komprenon antaŭ la resurekto de Lazaro, dirante *"Ni ankaŭ iru, por ke ni mortu kun Li"* (Joh 11,16), li sentas kiel Jesuo. Kial li ne estis enŝlosita kiel la aliaj? Ĉar li ne timas por si la saman sorton de Jesuo. Li ne estas timema kiel la aliaj, sin enŝlosintaj.

La aliaj disĉiploj tiam diris al li: „Ni vidis la Sinjoron!". Sed li deklaris: 'Se mi ne vidos en Liaj manoj la truojn de la najloj, se mi ne metos mian fingron tien, kaj se mi ne tuŝos per la mano la vundon de Lia brusto, mi ne kredos'". Tiu de Tomaso ne estas neo; ĝi estas deziro kredi ion mirindan, sed ne sukcesi ĝin kredi. La samo povas okazi al ni, kiam ni ricevas belegan novaĵon neatenditan. Kiel reagis ni? Ni diras: "Ne, ne estas vere!"; tio ne signifas, ke ni ne kredas, sed ke ĝi estas tiel bela, ke ni timas, ke ĝi ne veras. Aŭ ni eĉ diras: "ne, mi tion ne volas kredi!". Ni vere deziras kredi, ĉar ĝi superas niajn atendojn. Tiel kondukas Tomaso.

"Post ok tagoj... Jen la nova renkonto kun Jesuo, la rito de la eŭkaristio. la disĉiploj denove estis tie, kaj ankaŭ Tomaso kun ili. La pordoj estis fermitaj. Jesuo aperis, haltis en la mezo... kiel jam dirite "...kaj salutis: „Paco al vi!" la trian fojon. Poste Li diris al Tomaso: „Etendu ĉi tien vian fingron kaj rigardu miajn manojn; etendu vian manon kaj tuŝu Mian vunditan bruston. Estu ne plu nekredema, sed kredanta!". Tomaso respondis al Li: „Mia Sinjoro kaj mia Dio!"

Jen la plej grava fid-atesto de ĉiuj evangelioj. La aliaj disĉiploj, reprezentataj de Petro, akceptis, ke Jesuo estas la filo de Dio, la filo de Dio vivanta, la *"Kristo de Dio"* (Lk 9,20). Tomaso estas la sola, kiu, rigardante Jesuon, diras *"Mia Sinjoro kaj mia Dio!"*.

Johano, en la komenco de sia evangelio, asertas, "Neniu iam vidis Dion" (Joh 1,18), kaj nun Tomaso manifestas la plenecon de la kredo. Ĝuste Tomaso, kiu en nia tradicio estas konata kiel la disĉiplo nekredema, proklamas la plej plenan kredon en la evangelioj.

Jesuo diris al li: „Vi kredas, ĉar vi Min vidis: feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis kaj tamen kredas!“. Tiu estas la lasta deklaro pri beateco. Estas du tiaj deklaroj en la evangelio de Johano. La unua estas la beateco en la servado. (Joh 15,10). La servado, libere akceptata kaj memvole plenumata pro amo al la aliaj, igas ebla en la vivo la sperton pri Kristo resurektinta.

Ĉi tie Jesuo proklamas beataj tiujn, kiuj kredas ne vidinte. Al tiuj postulantaj signon por vidi kaj kredi, Jesuo proponas: “Ne; unue kredu vi, kaj tiel vi iĝas signo, kian aliaj povas rimarki”!

Kaj Johano konkludas tiel: “*Jesuo faris multajn aliajn miraklajn signojn antaŭ siaj disĉiploj, kiuj ne estis skribitaj*”. Tio aspektas kiel invito al verkado: skribu vian libron, verku vian evangelion; ni transdonas kion ni spertis, vi ĝin ensorbu, kaj ĝi estos via evangelio. Tion oni kutimis en la kristanaj komunumoj almenaŭ ĝis la 4-a jarcento.

Sed ĉi tiuj estis skribitaj, por ke vi kredu, ke Jesuo estas la Mesio kaj la Filo de Dio. Se vi kredas je Li, pere de Li vi havos vivon”. La kredo je Jesuo donacas vivon tian, ke ĝi superas la morton. Laŭ Johano la “vivo” estas la eterna vivo. Kaj la eterneco ne estas ĉiameco, sed nedetruoblo. Akcepti Jesuon en sia ekzisto signifas, ke tiu ekzisto plene realiĝas.